



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 228

Aprilo, 2005

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20



## ASKLEPIO



Asklepio, de ebura diptiko, 5a jarcento pK, de Urba Muzeo, Liverpool, Anglio. Dank Encyclopaedia Britannica.

Asklepio (greke, **Ἀσκληπιος**, Asklepios) estis la antikva dio de medicino. Fakte, laŭ helena mitologio, li estis parte dio kaj parte mortonto. La patro de Asklepio estis la dio Apolono. En tiu epoko, dioj ofte kondukis tre home: Apolono delogis la patrinon Koronis. Laŭ kelkaj rakontoj, Koronis estis nimfo aŭ duondiino, kaj laŭ aliaj, ŝi estis filino de Flegias, reĝo de Tesalio. Kiam Koronis ankoraŭ portis Asklepion en la utero, Apolono eltrovis, ke ŝi havis homan amanton kaj koleriĝis. Laŭ diversaj rakontoj, aŭ Apolono aŭ Artemiso, ĝemelino de Apolono, mortigis Koronis per fulmofrapo. La kadavro jam komencis bruli sur la funebra fajro kiam Apolono ŝiris la ventron de la mortintino kaj savis sian nenaskitan filon.

Estis en Tesalio en tiu epoko centaŭroj (duone homoj, duone ĉevaloj), iuj nerafinitaj kaj manĝantoj de nekuirita karno, kaj aliaj bonkonduktaj. Unu el la bonaj estis Kirono (filo de la Titano, Krono), kiu jam vartis Aĥilon (heroo de la troja milito) kaj Jazonon (la argonaŭto). Apolono prezentis la bebon al Kirono por eduki en la artoj de medicino kaj ĥirurgio. Asklepio estis lerta studanto kaj fariĝis renoma kuracisto.



Dank <http://www.holylandphotos.org/browse.asp?s=1,3,7,20,109&img=TWNAPA20>



Asklepio kun bastono kun volviĝinta serpento. Dank Vikipedio.

Li edzinigis Epione (Salus) kaj patriĝis. Du el liaj filoj, Machaon kaj Podalirius, fariĝis ĥirurgoj de la greka armeo en la troja milito. Inter la kvin filinoj de Asklepio estis Iaso (pli bone konata per la latina nomo Meditrina), Higiea kaj Panacea, respektive diino de kuracado, diino de sano, kaj enpersoniĝo de ĉiokuracantaj drogherboj. Asklepio lernis kiel revivigi mortintojn per uzo de la sango de serpentthara gorgono. La sango de la maldekstra flanko de la gorgono estis mortiga veneno, sed tiun de la dekstra flanko Asklepio uzis por revivigi mortintojn. Estis Atena mem kiu donis ujon kun gorgona sango al Asklepio. Hadeso, frato de Zeŭso, plendis, ke pro la laboro de Asklepio, ne sufiĉe da mortintoj alvenis en la subteran mondon. Tiukiale Zeŭso mortigis Asklepijon per fulmo-frapo. Kvankam Apolono ne povis helpi sian filon, li mortigis la ciklopojn kiuj forĝis la fulmaĵojn uzitajn de Zeŭso. Zeŭso, malgraŭ la mortigo, rekonis ke Asklepio estis laŭdinda resanigisto kaj ŝanĝis lin al la konstelacio „Ophiuchus”, la serpentportanto.

Homero menciis, ke Asklepio estis eminenta kuracisto. Poste Asklepio fariĝis heroo kaj ankoraŭ pli poste fariĝis dio. La kulto de Asklepio disvastiĝis tra la helena-romia mondo. La romianoj nomis Asklepijon „Eskulapo” (latine: Aesculapius). La centro de la kulto estis en Epidaŭro (en Argolando), kie estis granda templo aŭ asklepiejo. Estis aliaj asklepiejoj tra la „mondo”, kien venis homoj por bani, ekzerci sin, kaj manĝi laŭ saniga dieto. Malsanuloj dormis en tiuj temploj, esperante ke la dio vizitos ilin en la nokto, kaj en la mateno ili rakontis siajn sonĝojn al la sacerdotoj por interpretado. Iuj opinias, ke estas en asklepiejo, ĉe la insulo Kos, kie Hipokrato studis la medicinan arton.


Kiam oni vidas Asklepijon en artaĵoj, oni vidas la dion en longa robo, la brusto kaj dekstra ŝultro nudaj. Li portas bastonon, ĉirkaŭ kiu estas unu sola spirale volviĝinta serpento. Pro tio, ke kreskantaj serpentoj elhaŭtiĝas kaj evoluigas novan haŭton, ili estis simboloj de renaskiĝo kaj fekundeco. Tiu ĉirkaŭ la bastono de Asklepio estas senvenena serpento, *Elaphe longissima*, kiu apartenas al la familio kolubredoj. Tiuj reptilioj loĝas en Eŭropo, Azio kaj Ameriko, manĝas ranojn kaj musojn, kaj povas surgrimpi arbojn.

La bastono de Asklepio estis la simbolo de medicino en la antikva epoko kaj restas tio en la moderna tempo. Oni devas ne konfuzi la bastonon de Asklepio kun la flugilhava duserpenta bastono de Hermeso. Ĉi lasta estas simbolo de mesaĝistoj, komercistoj kaj ŝtelistoj. Interese, ĝi estas ankaŭ simbolo de la medicina sekcio de la usona armeo; evidentiĝas, ke iu



usona generalo estis malbone informita kiam li elektis la bastonon de Hermeso por esti simbolo de la medicina sekcio. Medicinistoj, adeptoj de Asklepio, devus uzi la unuserpantan bastonon kiel simbolon de siaj profesio kaj arto.

— Steĉjo



Hermeso (maldekstre) kaj komercisto aliras Asklepion. Dekstre staras tri el la filinoj de Asklepio: Iaso, Higiea kaj Panacea. Dank D-ro Keith Blayney, „The Caduceus vs the Staff of Asclepius”, retloko atingebla per Vikipedio.

Informfontoj:

Blayney, d-ro Keith: „The Caduceus vs. the Staff of Asclepius”, retloko:  
<http://myweb.lmu.edu/fjust/Asclepius.htm>

*Encarta*, Enciklopedio sur KD, Microsoft, 2004.

*Encyclopaedia Britannica Online*, pagata retservo.

*Larousse World Mythology*, Hamlyn Publishing Group Ltd, London, 1965.

Ledbetter, Ron: Asclepius. <http://www.pantheon.org/articles/a/asclepius.html>

Vanderhooft, d-ro Eric: Caduceus, the staff of Asclepius or Hermes. *The Pharos* [organo de AQA Medicina Honorsocieto], aŭtuno 2004, pp 22-26.

*Wikipedia* [Vikipedio], senkosta ĉereta enciklopedio [partoj estas en Esperanto].

Mi multe dankas al D-ro Geoffrey Greatrex kaj D-ro H. Wernik, kiuj bonkore korektis la manuskripton.

— S.N.

## VARNOMEKO<sup>1</sup>: FI!

En la merkata ekonomio varnomoj kaj frapfrazoj estas gravaj por komerca sukceso. Grandaj firmaoj vendas varojn kaj uzantoj aĉetas. Por instigi la uzantojn aĉeti la ĝustan markon, ĉiu manufakturisto devas propagandi sian propran varnomon. Ili elspezas grandajn sumojn en la reklamindustrio por disvastigi sloganojn por helpi la (eble mense kriplajn) aĉetontojn memori la varnomojn. La ideo de varnomoj por identigi aĉetindaĵojn nuntempe tiom furoras, ke eĉ nekomercaj entreprenoj deziras havi sian propran varnomon kaj frapfrazon por gurdi kaj montri sian gravecon.

Ve, la absurdaĵo ne preterpasis nian propran registaron. Ekzemple, la Provinco de NovSkotio lastatempe anoncis en nia ĉiusemajna ĵurnalo ke ĝi komencis kampanjon „por prezenti NovSkotion al la mondo”. Ĝia temo estas „Venu por...” (viziti / loĝi / lerni / prosperi / scii) kaj, la ĝenerala slogano estos „Venu al vivo”. Ĉu nia provinco ne estas sufiĉe bela kaj interesa por allogi vizitantojn sen uzo de komercstilaj frapvortoj?

Kaj nun, se ne la limo de tolero, almenaŭ plua simptomo de ĉi tiu kultura malsano nia: Lastatempe mi ricevis, per Google-Atentaĵoj, la suban anoncon: „Sunikeo, usona superentrepreno, proklamas la lanĉon de varnomec-komunik-firmao, ‚IDENTECO’, je la unua de marto, 2005”. La nova firmao ofertas servojn specife pri varnomoj, sloganoj, reklamado kaj rilatoj al la publiko<sup>2</sup>.

„ ... La nomo ‚IDENTECO’ devenas de la internacia lingvo, Esperanto. La celo de la reklamfirmao estas konstrui fortajn varnomojn por aktualaj internaciaj firmaoj.”

Ve la tempoj, ve la moroj.

— Gene Keyes

---

<sup>1</sup> „Varnomeco”: la enbruligo en la publikan menson de varnomo per senĉesa ripetado kaj reklamo ĝis homoj pavlove kunligas la varnomon kun iu vivstilo. Varnomoj ja ekzistis pli ol jarcento. Tamen la nuntempa pli intensa, pli larĝa praktiko akiris novan mem-agnoskon, kvazaŭ-reklamfilosofion; tial ni uzas la vorton: „varnomeco”.

<sup>2</sup> Legu: „propagandado kaj trompfanfarono”.

Jen la fino de 19 jaroj de *Inter Ni* (12 monatoj × 19 jaroj = 228 numeroj. En majo komenciĝos nia 20a jaro.